ESPERANTO
Verkaro de
Dº ZAMENHOF

# LA PREDIKANTO

## Libro el la Biblio

EL LA ORIGINALO TRADUKIS

Dro L. L. ZAMENHOF

**Librejo HACHETTE KAJ Ko**
79, Boulevard Saint-Germain, *PARIS*

KAJ ĜIAJ KORESPONDANTOJ :

DANUJO, ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, Bredgade 35, *KJÖBENHAVN*.
GERMANUJO, ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, Prinzenstrasse, 95, *BERLIN*.
GRANDA BRITUJO, REVIEW OF REVIEWS, Mowbray House, Norfolkstreet, *LONDON* W. C.
HISPANUJO, J. ESPASA, 579, Calle de las Cortes, *BARCELONA*.
ITALUJO, R. GIUSTI, 53, Via Vittorio Emanuele, *LIVORNO*.
RUSUJO, M. ARCT, 53, Nowy Swiat, *WARSZAWA*.
SVEDUJO, ESPERANTISTEN, 37, Surbrunnsgatan, *STOCKHOLM*.

**FRANCUJO.** — HACHETTE kaj K°, 79, Boul. St-Germain, Paris

## VERKOJ DE D^ro ZAMENHOF

ĈIU ESPERANTISTO DEVAS ILIN POSEDI

**Fundamento de Esperanto** :
**Eldono Franca, Angla, Germana, Rusa, Pola** (*bindita*) . . . . . . 3 »
(*La sama broŝurita*) . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 2 »
— **Hispana** . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1 »
— **Itala** (en presado) . . . . . . . . . . . . . . . . . 1 »
— **Greka** (en presado) . . . . . . . . . . . . . . . . . » »
*Oni vendas aparte* : **Ekzercaro** (kvinlingva) . . . . . . . . . . . . » 75
**Universala Vortaro** (kvinlingva) . . . . . . . . 1 »
**Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto** . . . . . . . . . . 3 50
**Hamleto**, tradukita el Shakespeare, *nova eldono* . . . . . . . . . 2 »
**La Revizoro**, tradukita el Gogol . . . . . . . . . . . . . . . . 1 50
**La Predikanto**, tradukita el « La Biblio » . . . . . . . . . . . . » »

## LERNOLIBROJ POR FRANCOJ

**Premier manuel de la langue auxiliaire Esperanto** . . . . . . . . . » 10
**Grammaire complète d'Esperanto**, par C. Aymonier . . . . . . . . . 1 50
**Grammaire et Exercices de la langue Esperanto**, par L. de Beaufront. 1 50
**Corrigé du précédent**, par L. de Beaufront . . . . . . . . . . . . . » 75
**Commentaire sur la grammaire Esperanto**, par L. de Beaufront . . 2 »
**Texte synthétique**, par L. de Beaufront . . . . . . . . . . . . . . » 50
**Thèmes d'application**, par L. de Beaufront . . . . . . . . . . . . 2 »
**L'Esperanto en dix leçons**, par Th. Cart et Pagnier . . . . . . . . » 75
**Corrigé du précédent**, par L. Marissiaux . . . . . . . . . . . . . 1 »
**Premières leçons d'Esperanto**, par Th. Cart . . . . . . . . . . . . » 30
**Cours commercial d'Esperanto**, par L. Marissiaux . . . . . . . . . 1 50
**Corrigé du précédent**, par Th. Cart et M. Procureur . . . . . . . » 50
**Dictionnaire Esperanto-Français**, par L. de Beaufront . . . . . . . 1 50
**Structure du dictionnaire Esperanto**, par L. de Beaufront . . . . » 30
**Vocabulaire Français-Esperanto** et **Vocabulaire abrégé Esperanto-Français**, par Th. Cart, M. Merckens et P. Berthelot . . . . . . . . . . . 2 50
**Vocabulaire des mots spéciaux à la philatélie**, par R. Lemaire . . » 40

## TEKSTOJ EN ESPERANTO

**Brueys et Palaprat**. *Advokato Patelin*, tradukita de J. Evrot . . . » 75
**Devjatnin**. *Verkaro* . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 2 »
**Diversaĵoj**, rakontetoj tradukitaj de S^oj Lallemant kaj Beau . . . . 1 25
**Ekzercoj de Aplikado**, de L. de Beaufront . . . . . . . . . . . . . 1 »
**Esperantaj prozaĵoj**, de diversaj aŭtoroj . . . . . . . . . . . . . 2 50
— (1^a Parto), *Rakontoj kaj Fabeloj* . . . . . . . » 25
**Esperanta Sintakso**, de P. Fruictier . . . . . . . . . . . . . . . 1 50
**Godineau**. *La Koloriĝisto-aerveturanto* . . . . . . . . . . . . . » 30
**Javal** (D^ro). *Inter blinduloj*, trad. S^ino J. Javal . . . . . . . . . 2 »
**Komercaj leteroj**, de P. Berthelot kaj Ch. Lambert . . . . . . . . » 50
**Kondukanto de l'interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio Internacia**, de Grabowski . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 2 »
**Kurso tutmonda**, de E. Gasse . . . . . . . . . . . . . . . . . . . » 75
**Labiche et Legouvé**. *Cikado ĉe Formikoj*, unuakta komedio . . . . » 60
**La Fontaine**. *Elektitaj Fabloj*, esperantigitaj de G. Vaillant . . . » 75
**La Komerca sekretario**, de Ros Sudria . . . . . . . . . . . . . . . » 50
**Leibniz**. *Monadologio*, tradukita de Emile Boirac . . . . . . . . . » 60
**Maistre** (X. de). *Vojaĝo interne de mia Ĉambro*. trad. de S. Meyer. » 75
**Matematika terminaro kaj krestomatio**, de R. Bricard . . . . . . . » 75
**Molière**. *L'Avarulo*, tradukita de S. Meyer . . . . . . . . . . . » 75
— *Don Juan*, tradukis E. Boirac . . . . . . . . . . . . . . 1 50
**Norman**. *Poŝlibro Internacia*, por Aferistoj, Turistoj, k. c. . . . . 2 »
**Orzesko**. *La interrompita kanto*, tradukita de Kabe . . . . . . . . » 75
**Perrault** (Ch.). *Rakontoj pri Feinoj*, tradukitaj de Sinjorino Sarpy. 1 »
**Pola Antologio**, elektis kaj tradukis Kabe . . . . . . . . . . . . 2 »
**Sieroŝevski** (Vaclav). *La Fundo de l'mizero*, tradukita de Kabe. . » 75
**Virgilio**. *Eneido*, kantoj I-XII, tradukita de D^ro Vallienne . . . . 3 »

(*Turnu.*)

# La Predikanto

COULOMMIERS
Imprimerie Paul BRODARD

ESPERANTO
Verkaro de
D^ro ZAMENHOF

# LA PREDIKANTO

## Libro el la Biblio

EL LA ORIGINALO TRADUKIS

D^ro L. L. ZAMENHOF

**Librejo HACHETTE KAJ K^o**
79, Boulevard Saint-Germain, *PARIS*

KAJ ĜIAJ KORESPONDANTOJ :

DANUJO, ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, Bredgade 35, *KJÖBENHAVN.*
GERMANUJO, ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, Prinzenstrasse, 95, *BERLIN.*
GRANDA BRITUJO, REVIEW OF REVIEWS, Mowbray House, Norfolkstreet, *LONDON W. C.*
HISPANUJO, J. ESPASA, 579, Calle de las Cortes, *BARCELONA.*
ITALUJO, R. GIUSTI, 53, Via Vittorio Emanuele, *LIVORNO.*
RUSUJO, M. ARCT, 53, Nowy Swiat, *WARSZAWA.*
SVEDUJO, ESPERANTISTEN, 37, Surbrunnsgatan, *STOCKHOLM.*

Ludwig Thalmaier
Kolpingstraße 484 B
D 8300 Landshut/Bayern
Telefon (0871) 4954

Esper. 505 II
BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL
11193

# LA PREDIKANTO

## ĈAPITRO I

Vortoj de la Predikanto, filo de Davido, reĝo en Jeruzalemo. Vantaĵo de vantaĵoj, diris la Predikanto, vantaĵo de vantaĵoj, ĉio estas vantaĵo. Kian profiton havas la homo de ĉiuj siaj laboroj, kiujn li laboras sub la suno? Generacio foriras kaj generacio venas, kaj la tero restas eterne. Leviĝas la suno kaj subiras la suno, kaj al sia loko ĝi rapidas, kaj tie ĝi leviĝas. Iras al sudo kaj reiras al nordo, turniĝas, turniĝas en sia irado la vento, kaj al siaj rondoj revenas la vento. Ĉiuj riveroj iras al la maro, sed la maro ne pleniĝas; al la loko, al kiu la riveroj alfluas, ili alfluas ĉiam denove. Ĉiuj vortoj estas malfortaj, ne povas homo ĉion eldiri; ne satiĝas la okulo de vidado kaj ne pleniĝas la orelo de aŭdado. Kio estis, tio estos, kaj kio estis farata, tio estos farata, kaj ekzistas nenio nova sub la suno. Ekzistas io, pri kio oni diras : « Vidu, tio ĉi estas nova »; sed ĝi estis jam en la eterna tempo, kiu estis antaŭ ni. Ne restis memoro pri la antaŭuloj; kaj ankaŭ pri la posteuloj, kiuj estos, ne restos memoro ĉe tiuj, kiuj estos poste. Mi, Predikanto, estis reĝo super Izraelo en Jeruzalemo. Kaj mi decidis en mia koro esplori kaj ekzameni per la saĝo ĉion, kio fariĝas sub la ĉielo : tiun ĉi malfacilan okupon Dio donis al la homidoj, por ke ili sin turmentu per ĝi. Mi vidis ĉiujn aferojn, kiuj fariĝas sub la suno, kaj jen, ĉio estas vantaĵo kaj arangôj ventaj. Kurbigitan oni ne

povas rerektigi, kaj mankantan oni ne povas kalkuli. Mi parolis kun mia koro tiele : jen mi kreskigis kaj multigis en mi sciencon pli ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ mi en Jeruzalemo, kaj mia koro penetris multon da saĝo kaj scio. Sed kiam mi dediĉis mian koron, por ekkoni la saĝecon kaj ekkoni la malsaĝecon kaj sensencecon, mi eksciis, ke ankaŭ tio ĉi estas entrepreno venta. Ĉar ĉe multe da saĝeco estas multe da koleremeco, kaj, kiu plimultigas siajn sciojn, plimultigas siajn dolorojn.

## ĈAPITRO II

Mi diris en mia koro : lasu, mi elprovos vin per ĝojo, kaj vi ĝuu bonon; sed jen ankaŭ tio ĉi estas vantaĵo. Pri la rido mi diris : ĝi estas sensencaĵo! kaj pri la ĝojo : kion ĝi havigas? Mi decidis en mia koro plezurigi mian korpon per vino kaj, dum mia koro sin gvidas per saĝeco, sekvi ankaŭ malsaĝecon, ĝis mi ekvidos, kio estas bona por la homidoj, kion ili povus fari sub la ĉielo en la kalkulitaj tagoj de sia vivo. Mi entreprenis grandajn farojn, mi konstruis al mi domojn, mi plantis al mi vinberejojn. Mi aranĝis al mi ĝardenojn kaj arbaretojn kaj plantis en ili ĉiafruktajn arbojn. Mi aranĝis al mi akvujojn, por akvi el ili arbaretojn, kiuj kreskigas arbojn. Mi akiris al mi sklavojn kaj sklavinojn, kaj domanojn mi havis; ankaŭ da bruto granda kaj malgranda mi havis pli multe, ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ mi en Jeruzalemo. Mi kolektis al mi ankaŭ arĝenton kaj oron kaj juvelojn de reĝoj kaj landoj; mi havigis al mi kantistojn kaj kantistinojn kaj plezurojn de homidoj kaj diversajn belegajn ĉambrojn. Kaj mi pligrandigis kaj plimultigis ĉion pli ol ĉiuj, kiuj estis antaŭ mi en Jeruzalemo, kaj mia saĝeco helpis min en tio. Kaj ĉion, kion postulis miaj okuloj, mi ne rifuzis al ili, mi fortenis mian koron de nenia ĝojo, ĉar mia koro ĝojis pri ĉiuj miaj laboroj, kaj tio ĉi estis mia rekompenco por ĉiuj miaj laboroj. Kaj mi ekrigardis ĉiujn farojn, kiujn faris miaj manoj, kaj ĉiujn laborojn, kiujn mi plenumis, por fari ilin, — kaj jen, ĉio estas vantaĵo kaj venta entrepreno, kaj nenia profito estas de ili sub la suno. Kaj mi turnis min por rigardi saĝecon kaj malsaĝecon kaj

sensencecon, ĉar kion povas fari homo post reĝo en komparo kun tio, kion tiu jam antaŭ longe faris? Kaj mi vidis, ke havas superecon la saĝeco antaŭ la malsaĝeco, kiel havas superecon lumo antaŭ mallumo. La saĝulo havas siajn okulojn en la kapo, kaj la malsaĝulo iras en mallumo; sed mi ankaŭ eksciis, ke unu sorto atingas ilin ĉiujn. Kaj mi diris en mia koro : ankaŭ min atingos tia sama sorto, kiel la malsaĝulon; por kio do mi estis pli saĝa? Kaj mi diris en mia koro, ke ankaŭ tio ĉi estas vantaĵo. Ĉar pri la saĝulo ne restos memoro eterne tiel same, kiel pri la malsaĝulo; en la tempoj estontaj ĉio estos forgesita, kaj ho ve, mortas saĝulo egale kiel malsaĝulo. Kaj mi ekmalamis la vivon, ĉar abomenindaj estas por mi la faroj, kiuj fariĝas sub la suno, ĉar ĉio estas vantaĵo kaj ventaĵo. Kaj mi ekmalamis ĉiun laboron, kiun mi laboris sub la suno, ĉar mi lasos ĝin al homo, kiu estos post mi. Kaj kiu scias, ĉu estos saĝa aŭ malsaĝa tiu, kiu ekposedos mian tutan laboron, pri kiu mi penis kaj streĉis mian saĝon sub la suno? Ankaŭ tio ĉi estas vantaĵo. Kaj mi decidis, ke mia koro atendu nenion de la tuta laboro, kiun mi laboris sub la suno. Ĉar ofte oni vidas homon, kiu laboras en saĝo, scienco kaj talento, kaj li devas fordoni sian akiron al homo, kiu ne laboris por ĝi; tio ĉi ankaŭ estas vantaĵo kaj granda malbono. Kaj kio restas al la homo de lia tuta laborado kaj de la zorgoj de lia koro, kion li laboras sub la suno? Ĉar ĉiuj liaj tagoj estas suferoj kaj liaj okupoj estas maltrankvileco; eĉ en la nokto ne trankviliĝas lia koro; ankaŭ tio ĉi estas vantaĵo. Ne ekzistas alia bono por la homo krom manĝi kaj trinki kaj igi sian animon ĝui plezuron de sia laborado; ankaŭ pri tio ĉi mi vidis, ke ĝi estas de la mano de Dio. Ĉar kiu povas manĝi, kaj kiu povas ĝui sen Li? Ĉar al homo, kiu agas bone antaŭ Li, Li donas saĝon kaj scion kaj ĝojon, kaj al la pekulo li donas la zorgemecon amasigi kaj kolekti, por poste transdoni al tiu, kiu agas bone antaŭ Dio; kaj tio ĉi estas vantaĵo kaj ventaĵo.

## ĈAPITRO III

Por ĉio estas tempo, kaj horo difinita estas por ĉiu afero sub la suno. Estas tempo por naski kaj tempo por morti; estas tempo por planti kaj tempo por elŝiri la plantitaĵon. Estas tempo por mortigi kaj tempo por kuraci; estas tempo por detrui kaj tempo por konstrui. Estas tempo por plori kaj tempo por ridi; estas tempo por ĝemi kaj tempo por salti. Estas tempo por disĵeti ŝtonojn kaj tempo por kolekti ŝtonojn; estas tempo por ĉirkaŭbraki kaj tempo por foriri de ĉirkaŭbrakado. Estas tempo por serĉi kaj tempo por perdi; estas tempo por konservi kaj tempo por ĵeti. Estas tempo por disŝiri kaj tempo por kunkudri; estas tempo por silenti kaj tempo por paroli. Estas tempo por ami kaj tempo por malami; estas tempo por milito kaj tempo por paco. Kian profiton havas faranto de tio, kion li laboras? Mi vidis la penemecon, kiun Dio donis al la homidoj, por ke ili turmentiĝu per ĝi. Ĉion Li kreis bela siatempe, kaj scion pri la mondo Li enmetis en ilian koron, sed tiel, ke homo ne povas kompreni la farojn, kiujn faris Dio, de la komenco ĝis la fino. Mi scias, ke ekzistas nenia bono por ili, krom ĝoji kaj fari bonon en sia vivo. Kaj se homo manĝas kaj trinkas kaj ĝuas bonon de sia tuta laborado, ĝi estas dono de Dio. Mi scias ke ĉio, kion faras Dio, restas eterne; al ĝi oni nenion bezonas aldoni, kaj de ĝi oni nenion bezonas depreni: kaj Dio faris, ke oni Lin timu. Kio fariĝis, tio ekzistas de longe, kaj kio estas fariĝonta, tio antaŭ longe jam estis, kaj Dio revokas pasintaĵon. Ankoraŭ mi vidis sub la suno: loko de juĝo, kaj tie estas maljusteco; loko de

vero, kaj tie estas malico. Mi diris en mia koro : piulon kaj malpiulon juĝos Dio; ĉar estas tempo por ĉiu afero kaj por ĉio, kio fariĝas tie. Mi diris en mia koro : tio ĉi estas por la homidoj, por ke Dio ilin elprovu, kaj por ke ili vidu, ke ili estas bruto per si mem. Ĉar la sorto de homidoj kaj la sorto de bruto estas sorto egala : kiel ĉi tiuj mortas, tiel mortas ankaŭ tiuj, kaj sama spirito estas en ĉiuj, kaj supereco de homo kontraŭ bruto ne ekzistas, ĉar ĉio estas vantaĵo. Ĉio iras al unu loko : ĉio fariĝis el polvo kaj ĉio refariĝos polvo. Kiu scias, ĉu la spirito de homidoj leviĝas supren kaj ĉu la spirito de bruto malleviĝas malsupren en la teron? Kaj mi ekvidis, ke ekzistas nenio pli bona, ol ke homo ĝuu plezuron de siaj faroj, ĉar tia estas lia sorto; ĉar kiu alkondukos lin, por vidi, kio estas post li?

## ĈAPITRO IV

Kaj mi returniĝis kaj mi vidis ĉiujn premojn, kiuj estas farataj sub la suno : kaj jen estas larmoj de prematoj, kaj ne ekzistas por ili konsolanto; kaj perforteco de la mano de iliaj premantoj, kaj ne ekzistas por ili konsolanto. Kaj mi trovis, ke la mortintoj, kiuj jam antaŭ longe mortis, estas pli feliĉaj ol la vivantoj, kiuj vivas ĝis nun. Kaj pli feliĉa ol ili ambaŭ estas tiu, kiu ĝis nun ne ekzistis, kiu ne vidis la malbonajn farojn, kiuj estas farataj sub la suno. Mi vidis ankaŭ, ke ĉiu laboro kaj ĉiu akurateco en la faroj estas nur konkurado de unu kontraŭ alia, kaj ankaŭ tio ĉi estas vantaĵo kaj ventaĵo. Malsaĝulo kunmetas siajn manojn kaj formanĝas sian korpon. Pli bona estas plenmano da trankvilanimeco, ol ambaŭmano da penado kaj ventaĵo. Kaj denove mi vidis vantaĵon sub la suno : jen estas solulo kaj neniun alian li havas, nek filon nek fraton li havas; kaj tamen ne havas finon lia laborado, kaj lia okulo ne povas satiĝi de riĉeco; por kiu do mi laboras kaj senigas mian animon de ĝuado? Tio ĉi ankaŭ estas vantaĵo kaj malbona afero. Pli bone estas al du ol al unu, ĉar ili havas bonan rekompencon por sia laborado. Ĉar se ili falos, unu levos la alian; sed ve al unu, se li falos, kaj se ne estas alia, kiu lin levus. Ankaŭ se du kuŝiĝas, estas al ili varme, sed unu — kiel li varmiĝos? Kaj se iu montros sin pli forta kontraŭ unu, tiam ambaŭ staros kontraŭ li; eĉ fadeno triopigita ne baldaŭ disŝiriĝos. Pli bona estas knabo malriĉa sed saĝa, ol reĝo maljuna sed malsaĝa, kiu jam ne povas akiri scion. Iu el malliberejo eliris kaj fariĝis reĝo, alia por reĝeco naskiĝis kaj

tamen estas malriĉa. Mi vidis, ke ĉiu vivanto iras sub la suno kun infano : ĝi estas la alia, kiu okupos lian lokon. Senfina estas la popolo, kiu estis antaŭ ili, kaj ankaŭ la posteuloj ne ĝojos pri li; ankaŭ tio ĉi estas vantaĵo kaj ventaĵo. Gardu vian piedon, kiam vi iros en domon de Dio, kaj estu preta pli por aŭskultado, ol por oferdonado de malsaĝuloj; ĉar ili ne scias, ke ili agas malbone.

---

## ĈAPITRO V

Ne rapidu kun via buŝo, kaj via koro ne rapidu elparoli vorton antaŭ Dio, ĉar Dio estas en la ĉielo, kaj vi estas sur la tero; tial malmultaj estu viaj vortoj. Ĉar la sonĝo prezentiĝas per multe da agado, kaj parolo de malsaĝulo konsistas el multe da vortoj. Kiam vi faros promeson al Dio, ne prokrastu ĝin plenumi, ĉar malagrablaj estas malsaĝuloj; kion vi promesis, tion plenumu. Pli bone estas, ke vi ne faru promeson, ol fari promeson kaj ne plenumi. Ne permesu al via buŝo pekigi vian korpon, kaj ne diru al la sendito de Dio, ke ĝi estas eraro; kial fari, ke Dio koleru pro via parolo, kaj ke Li detruu la faron de viaj manoj? Ĉe multo da sonĝoj kaj vantaĵoj estas ankaŭ multe da vortoj; sed vi timu Dion. Se premadon de malriĉulo kaj rompadon de justeco kaj honesteco vi vidas en lando, ne miru, ĉar pli alta kontrolas pli altan kaj plej altaj ilin kontrolas. Kaj superecon en ĉio havas tiu lando, en kiu la reĝo servas al la tero. Kiu amas arĝenton, tiu ne satiĝos per arĝento, kaj kiu amas riĉecon, al tiu ĝi ne donos utilon; ankaŭ tio ĉi estas vantaĵo. Ju pli estas da havo, des pli multaj estas ĝiaj konsumantoj; kaj kian profiton havas ĝia mastro krom vidi ĝin per siaj okuloj? Dolĉa estas la dormo de laboranto, ĉu li manĝas malmulte aŭ multe; sed trosateco ne lasas la riĉulon dormi. Turmentan malbonon mi vidis sub la suno : riĉecon konservatan por la malutilo de ĝia propra mastro. Kaj pereas tiu ĉi riĉeco en malfavoraj cirkonstancoj; naskiĝas filo, kaj li nenion havas en la mano. Kiel li eliris el la ventro de sia patrino, tiel nuda li foriras, kiel li venis, kaj nenion li

elportas el sia laboro, kion li povus porti en la mano. Kaj tio ĉ estas turmenta doloro, ke kiel li venis, tiel li foriras; kian do profiton li havas de tio, ke li laboras por la vento? Kaj ĉiujn siajn tagojn li konsumis en mallumo, en multe da ekscitiĝo, en malsanc kaj malagrablaĵoj! Jen, kion mi vidis bonan, ke estas bele manĝi kaj trinki kaj ĝui plezurojn de ĉiuj siaj laboroj, kiujn homo laboras sub la suno en la malmultaj tagoj de sia vivo, kiujn donis al li Dio; ĉar tio estas lia apartenaĵo. Kaj se al iu homo Dio donis riĉecon kaj havon kaj donis al li la povon konsumi ilin kaj preni sian parton kaj ĝui plezuron de siaj laboroj, — tio ĉi estas dono de Dio. Ĉar ne longe li memoros la tagojn de sia vivo, Dio donas al li ĝojon de lia koro.

## ĈAPITRO VI

Ekzistas malbono, kiun mi vidis sub la suno, kaj granda ĝi estas por la homo : se al iu homo Dio donas riĉecon kaj havon kaj honoron, kaj al lia animo mankas nenio, kion ajn li dezirus, sed Dio ne donas al li la povon konsumi ĝin, nur fremda homo ĝin konsumas, — tio ĉi estas vantaĵo kaj malfacila doloro. Se iu homo naskus cent infanojn kaj vivus multajn jarojn kaj atingus profundan aĝon, sed lia animo ne ĝuus sate la havon, kaj eĉ bonan enterigon li ne havus, — tiam mi dirus : pli feliĉa ol li estas abortito. Ĉar tiu ĉi vante venis kaj en mallumon foriris, kaj en mallumo kaŝiĝos lia nomo. Eĉ la sunon li ne vidis kaj ne konis, — al li estas pli trankvile ol al tiu. Kaj se tiu homo vivus du mil jarojn kaj la bonon ne ĝuus, ĉu ne al unu loko ĉio iros? Ĉiuj laboroj de homo estas por lia buŝo, kaj tamen lia animo ne estas satigebla. Kaj kian superecon havas la saĝulo antaŭ malsaĝulo, la inteligenta malriĉulo antaŭ aliaj vivaj estaĵoj? Pli bone estas vidi per la okuloj, ol imagi en la animo; ankaŭ tio ĉi estas vantaĵo kaj ventaĵo. Kio ekzistas, tio de longe havas nomon, kaj oni scias, ke ĝi estas homo, kaj ke li ne povas juĝe batali kun tiu, kiu estas pli forta ol li. Ĉar ekzistas multe da aferoj, kiuj plimultigas la vantaĵon; kian do superecon havas la homo? Ĉar kiu scias, kio estas bona por la homo en la nemultaj tagoj de lia vanta vivo, kiun li pasigas kiel ombro, kaj kiu diros al la homo, kio estos post li sub la suno?

## ĈAPITRO VII

Pli bona estas bona nomo, ol bona oleo, kaj la tago de la morto estas pli bona ol la tago de la naskiĝo. Pli bone estas iri en domon de funebro, ol iri en domon de festenado, ĉar morto estas la fino de ĉiu homo, kaj la vivanto notos tion ĉi en sia koro. Pli bona estas plendo ol rido, ĉar ĉe malĝojo de la vizaĝo pliboniĝas la koro. La koro de saĝuloj estas en domo de funebro, kaj la koro de malsaĝuloj en domo de ĝojo. Pli bone estas aŭskulti riproĉon de saĝulo, ol aŭskulti kanton de malsaĝuloj. Ĉar simila al la kraketado de branĉetaĵo sub poto estas la ridado de la malsaĝuloj, kaj vantaĵo ĝi estas. Ĉar perforteco forprenas la saĝon de saĝulo, kaj koron malbonigas donaco. La fino de afero estas pli bona ol ĝia komenco; pacienculo estas pli bona ol malhumilulo. Ne rapidu koleri en via spirito, ĉar koleremeco loĝas en la brusto de malsaĝuloj. Ne diru : « Kial la antaŭaj tagoj estis pli bonaj ol la nunaj? » Ĉar ne pro saĝeco vi tion ĉi demandus. Pli bona estas saĝeco, ol hereda havo, kaj ĝi estas profita al tiuj, kiuj vidas la sunon. Ĉar sub la ŝirmo de saĝeco estas tiel same, kiel sub la ŝirmo de arĝento; sed la supereco de scienco konsistas en tio, ke la saĝeco donas vivon al sia posedanto. Rigardu la faron de Dio; ĉar kiu povas rektigi, kion Li kurbigis? En la tago de bonstato uzu la bonstaton, kaj en tago de malfeliĉo atendu : tion ĉi kaj tion aranĝis Dio, por ke la homo nenion komprenu post Li. Ĉion mi vidis en miaj vantaj tagoj : okazas, ke virtulo pereas ĉe sia virteco, kaj okazas, ke malvirtulo longe vivas ĉe sia malvirteco. Ne estu tro virta kaj ne rezonu tro

multe : kial vi devas vin konfuzi? Ne malvirtu tro multe, kaj ne estu senprudenta : kial vi devas morti ne en via tempo? Bone estas, se vi tenos vin je unu afero kaj ankaŭ de alia afero vi ne forprenos vian manon; ĉar, kiu timas Dion, penas plaĉi al ĉiuj. La saĝeco faras la saĝulon pli forta, ol dek potenculoj en la urbo. Ĉar ne ekzistas sur la tero virtulo, kiu farus nur bonon kaj ne pekus. Ne ĉiujn vortojn, kiujn oni diras, atentu en via koro, por ke vi ne aŭdu vian sklavon malbenanta vin. Ĉar multajn fojojn konsciis via koro, ke ankaŭ vi malbenis aliajn. Ĉion tion ĉi mi esploris per mia saĝo; mi diris al mi : « mi akiru saĝon », tamen ĝi estas malproksima de mi. Malproksima estas tio, kio estis, kaj profunda, profunda, — kiu ĝin komprenos? Mi turnis min kun mia koro, por ekkoni, esplori kaj traserĉi saĝecon kaj prudenton kaj ekscii, ke la malvirteco estas malsaĝeco kaj la senscieco estas sensenca. Kaj mi trovas, ke pli malbona ol la morto estas la virino, ĉar ĝi estas reto, kaj ŝia koro estas kaptilo, ŝiaj manoj estas katenoj; kiu plaĉas al Dio, tiu sin savos de ŝi, kaj pekulo estos kaptita de ŝi. Jen, kion mi trovis, diris la Predikanto : oni devas kunigi unu fakton kun alia, por veni al konkludo. Jen, kion ankoraŭ serĉis mia animo kaj ne trovis : viron unu inter mil mi trovis, sed virinon inter ĉiuj mi tute ne trovis. Nur tion ĉi mi trovis, ke Dio kreis la homon virtema, sed la homoj fordonis sin al multaj artifikoj.

# ĈAPITRO VIII

Kiu estas simila al saĝulo, kaj kiu komprenas la sencon de la aferoj? Saĝeco de homo lumigas lian vizaĝon, kaj la maldelikateco de lia vizaĝo ŝanĝiĝas. Mi diras : la reĝan ordonon plenumu, pro la ĵuro farita antaŭ Dio. Ne rapidu foriri de antaŭ li, kaj ne estu persistema en malbona afero; ĉar ĉion, kion li volos, li povos fari. Ĉar la vorto de reĝo estas potenca, kaj kiu povas diri al li : « Kion vi faras? » Kiu plenumas la ordonon, spertos nenion malbonan; tempon kaj manieron de agado scias la koro de saĝulo. Ĉar por ĉiu afero estas sia tempo kaj maniero; kaj granda estas por la homo la malbono de tio, ke li ne scias, kio estos; ĉar kiu diros al li, kiel estos? Neniu homo povas regi la venton kaj reteni la venton, neniu povas regi la tagon de la morto; ne ekzistas forpermeso en la milito, kaj malvirteco ne savas sian faranton. Ĉion tion ĉi mi vidis, kaj mi atentis ĉiun aferon, kiu estas farata sub la suno, kaj tiun tempon, en kiu homo regas homon al lia malbono. Kaj ankaŭ mi vidis, ke oni enterigis malvirtulojn, kiuj venadis kaj eliradis el la sankta loko, kaj kiuj estis forgesitaj en la urbo, kie ili tiel agis; kaj tio ĉi ankaŭ estas vantaĵo. Ĉar ne baldaŭ estas farata juĝo kontraŭ malbonaj faroj, tial plene kuraĝas la koro de homidoj fari malbonon. Kvankam pekulo faras malbonon cent fojojn, kaj Dio estas pacienca al li, tamen mi scias, ke estos bone al tiuj, kiuj timas Dion, kiuj respektas Lin. Kaj ne estos bone al malvirtulo, kaj ne tenos sin longe, simile al ombro, tiu, kiu ne timas Dion. Ekzistas vantaĵo, kiu fariĝas sur la tero : ekzistas virtuloj, al kiuj fariĝal

tio sama, kio fariĝas al malvirtuloj; kaj ekzistas malvirtuloj, al kiuj fariĝas tio sama, kio al la virtuloj; kaj mi diris al mi, ke ankaŭ tio ĉi estas vantaĵo. Kaj mi eklaŭdis la gajecon, ĉar ne ekzistas io pli bona por homo sub la suno, ol manĝi, trinki kaj gaji, kaj tio ĉi akompanas lin en liaj laboroj en la tagoj de lia vivo, kiujn donis al li Dio sub la suno. Kiam mi direktis mian koron, por ekkoni saĝecon kaj ĉirkaŭrigardi la aferojn, kiuj estas farataj sur la tero tiamaniere, ke nek tage nek nokte homo vidas dormon sur siaj okuloj; kaj kiam mi rigardis ĉiujn farojn de Dio, — tiam mi trovis, ke homo ne povas kompreni la aferojn, kiuj fariĝas sub la suno; kiom ajn la homo penus esplori, li ne komprenos; kaj se eĉ saĝulo diras, ke li scias, li tamen ne povas kompreni.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL

## ĈAPITRO IX

Al ĉio ĉi tio mi direktis mian koron, por esplori ĉion ĉi tion, ke la virtuloj kaj saĝuloj kaj iliaj faroj estas en la mano de Dio; kaj nek amon nek malamon scias la homo kaj nenion, kio lin atendas. Al ĉiuj estas la sama sorto, al la virtulo kaj al la malvirtulo, al la bona kaj pura kaj al la malpura, al la oferfaranto kaj al tiu, kiu ne oferfaras, al la bonulo kaj al la pekulo, al la ĵuranto kaj al tiu, kiu timas ĵuron. Tio ĉi estas malbona en ĉio, kio fariĝas sub la suno, ke la sama sorto ekzistas por ĉiuj, kaj la koro de la homidoj estas plena de malbono, kaj sensencaĵo estas en ilia koro dum ilia vivado, kaj poste ili transiras al la mortintoj. Ĉar kiu troviĝas inter la vivuloj, tiu havas ankoraŭ esperon, ĉar eĉ al hundo vivanta estas pli bone, ol al leono mortinta. Ĉar la vivantoj scias, ke ili mortos, kaj la mortintoj scias nenion, kaj por ili jam ne ekzistas rekompenco, ĉar la memoro pri ili estas forgesita. Kaj ilia amo, kaj ilia malamo, kaj ilia ĵaluzo jam de longe malaperis, kaj jam por neniam ili havas partoprenon en io, kio fariĝas sub la suno. Iru, manĝu gaje vian panon, kaj trinku kun gaja koro vian vinon, se Dio favoris viajn aferojn. En ĉiu tempo viaj vestoj estu blankaj, kaj oleo ne manku sur via kapo. Ĝuu la vivon kun la edzino, kiun vi amas en la tempo de via tuta vanta vivo, kaj kiun Dio donis al vi por ĉiuj viaj vantaj tagoj; ĉar tio ĉi estas via apartenaĵo en via vivo kaj en viaj laboroj, kiujn vi laboris sub la suno. Ĉion, kion via mano povas fari, faru laŭ viaj fortoj; ĉar ekzistas nek faro, nek kalkulo, nek scio, nek saĝo en la tombo, kien vi iros. Aliflanke mi

vidis sub la suno, ke ne de la rapiduloj dependas la kuro, ne de la fortuloj dependas la milito, kaj ne la saĝuloj havas panon, kaj ne la talentuloj havas riĉecon, kaj ne la kompetentuloj trovas aprobon; nur de la tempo kaj okazo ili ĉiuj dependas. Ĉar eĉ ne scias la homo sian sorton; kiel fiŝoj, kaptitaj en pereigan reton, kaj kiel birdoj, implikiĝintaj en kaptilon, tiel kaptiĝas la homoj en tempo malbona, kiam ĝi atakas ilin neatendite. Ankaŭ jenan saĝaĵon mi vidis sub la suno, kaj ĝi ŝajnis al mi granda. Urbo malgranda kaj malmulte da homoj ĝi havas; venis al ĝi granda reĝo kaj sieĝis ĝin kaj konstruis ĉirkaŭ ĝi grandajn sieĝajn fortikaĵojn. Sed troviĝis en ĝi homo malriĉa sed saĝa, kaj li savis la urbon per sia saĝeco; tamen neniu rememoris tiun malriĉan homon. Kaj mi diris : pli bona estas saĝo ol forto, tamen la saĝo de malriĉulo estas malrespektata, kaj liaj vortoj ne estas aŭdataj. La vortoj de saĝuloj, trankvile aŭskultitaj, estas pli bonaj ol la kriado de reganto super malsaĝuloj. Pli bona estas saĝo, ol militaj instrumentoj, kaj unu pekulo pereigas multe da bono.

## ĈAPITRO X

Venenaj muŝoj malbonigas kaj fermentigas bonodoran oleon; pli kara ol saĝo kaj honoro ofte estas malgranda malsaĝaĵo. La koro de saĝulo estas ĉe lia dekstra flanko, kaj la koro de malsaĝulo ĉe lia maldekstra. Kaj eĉ en la vojo, laŭ kiu iras malsaĝulo, mankas al li saĝo, kaj al ĉiu li diras, ke li estas malsaĝulo. Se atakos vin kolero de reganto, ne forlasu vian lokon, ĉar humileco pardonigas eĉ grandajn krimojn. Ekzistas malbono, kiun mi vidis sub la suno, — ĝi estas kvazaŭ eraro, venanta de la reganto : senscieco estas metata tre alte, kaj la riĉuloj sidas malalte. Mi vidis sklavojn sur ĉevaloj kaj princojn, irantajn piede, kiel sklavoj. Kiu fosas kavon, tiu falos en ĝin, kaj kiu detruas muron, tiun mordos serpento. Kiu transmovas ŝtonojn, faras al si difekton per streĉo, kaj kiu hakas lignon, sin vundas per ĝi. Se malakriĝis la hakilo, kaj oni ne akrigas la tranĉan flankon, oni devas streĉi la fortojn, kaj la ĉefaĵo estas prepari ĉion saĝe. Se mordis la serpento sen kuracparolo, tiam ne utilas jam kuracparolanto. Vortoj el buŝo de saĝulo estas agrablaj, kaj la buŝo de malsaĝulo lin mem pereigas. La komenco de la parolo de lia buŝo estas malsaĝaĵo, kaj la fino de lia parolo estas abomeninda sensencaĵo. Malsaĝulo multe parolas, kvankam homo ne scias, kio estos, kaj kio estos post li, — kiu tion ĉi diros al li? Penado de malsaĝuloj lacigas tiun, kiu ne scias eĉ la vojon al la urbo. Ve al vi, lando, se via reĝo estas infano kaj viaj princoj manĝas frue. Feliĉa vi estas, lando, se via reĝo estas de nobla deveno kaj viaj princoj manĝas en ĝusta tempo, por fortiĝi, ne por

festeni. De mallaboremeco falos la plafono, kaj, se oni mallevas la manojn, tramalsekiĝas la domo. Por plezuro oni arangas festenojn, kaj vino gajigas la vivon, kaj arĝento respondas por ĉio. Eĉ en viaj pensoj ne malbenu la reĝon, kaj en via dormoĉambro ne malbenu riĉulon; ĉar birdo ĉiela transportos vian voĉon, kaj flugila estaĵo eldiros vian parolon.

## ĈAPITRO XI

Sendu vian panon sur akvon, ĉar post longa tempo vi ĝin retrovos. Donu parton al sep kaj eĉ al ok, ĉar vi ne scias, ĉu ne estos malfeliĉo sur la tero. Kiam la nuboj pleniĝos, ili verŝos pluvon sur la teron, kaj se falos arbo suden aŭ norden, ĝi tie restos, kien ĝi falis. Kiu observas la venton, tiu ne semos, kaj kiu rigardas la nubojn, tiu ne rikoltos. Kiel vi ne scias, kian vojon iros la vento, kaj kiel formiĝas la ostoj en la ventro de gravedulino, tiel vi ne povas scii la faron de Dio, kiu ĉion faras. Matene semu vian semon, kaj vespere via mano ne ripozu, ĉar vi ne scias, ĉu tio aŭ alio estos pli ĝusta, aŭ ambaŭ egale estas bonaj. Agrabla estas la lumo, kaj bone estas al la okuloj vidi la sunon. Se eĉ multajn jarojn homo vivus, li ĝoju en ili ĉiuj, kaj li memoru pri la tagoj mallumaj, ĉar estos multe da ili; ĉio, kio venos, estas vantaĵo. Ĝoju, junulo, en via infaneco, kaj via koro ĝuu plezuron en la tagoj de via juneco, kaj iru, kien kondukas vin via koro, kaj kien rigardas viaj okuloj; sed sciu, ke pri ĉio ĉi tio Dio venigos vin al juĝo. Forpelu malĝojon de via koro, kaj forigu malagrablaĵon de via korpo, ĉar la infaneco kaj juneco estas vantaĵo.

## ĈAPITRO XII

Kaj memoru vian Kreinton en la tagoj de via juneco, dum ne venis ankoraŭ la tagoj de malbono kaj ne venis la jaroj, pri kiuj vi diros : « mi ne havas plezuron de ili »; dum ne mallumiĝis la suno, la lumo, la luno kaj la steloj, kaj ne revenis nuboj post la pluvo. Kiam ektremos la gardantoj de la domo kaj malfortiĝos la militantoj, kaj ĉesos mueli la muelantoj, ĉar estos malmulte da ili, kaj senvidiĝos la rigardantoj tra la fenestroj; kaj fermitaj estos la pordoj al la strato, kiam eksilentos la sonado de la muelŝtono; kaj homo leviĝados laŭ la krio de birdo, kaj mallaŭtiĝos la sonoj de kantoj; kaj altaĵojn ili ektimos, kaj sur la vojo aperos teruroj, kaj ekfloros la migdalarbo kaj peziĝos la grilo, kaj malaperos deziro : tiam homo foriros en sian eternan domon, kaj sur la strato marŝos plorantoj; ĝis disŝiriĝos la arĝenta ĉeneto, rompiĝos la ora lampeto, rompiĝos la kruĉo ĉe la fonto kaj falos la rado en la puton. Kaj la polvo refariĝos tero, kiel ĝi estis, kaj la spirito reiros al Dio, kiu ĝin donis. Vanto de vantaĵoj diris la Predikanto, ĉio estas vantaĵo. Krom tio, ke la Predikanto estis saĝulo, li ankoraŭ instruis scion al la popolo; li ĉion pesis, esploris kaj verkis multe da sentencoj. Penis la Predikanto trovi agrablajn parolojn, kaj li skribis ĝuste vortojn de vero. La paroloj de saĝuloj estas kiel akraj pintoj, kaj kiel enbatitaj najloj estas la vortoj de publikaj parolistoj; ili

estas donitaj de unu paŝtisto. Kaj krom tio, mia filo, akceptu mian instruon, ke se oni volus verki multajn librojn, ne estus fino, kaj multe legi lacigas la korpon. Ni aŭskultu la finon de ĉio : timu Dion kaj plenumu Liajn ordonojn, ĉar tio ĉi estas ĉio por la homo. Ĉar ĉiun faron Dio venigos al juĝo, eĉ ĉion kaŝitan, ĉu ĝi estas bona aŭ malbona.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

737-07. — Coulommiers. Imp. PAUL BRODARD. — P7-07.

# Verkaro de Dro L. L. ZAMENHOF

*Aĉetebla ĉe ĉiuj eldonistoj de « La Revuo »*

Ĉiu Esperantisto

devas nepre posedi la verkojn de nia Majstro !

## FUNDAMENTO DE ESPERANTO :

**Eldono Franca, Angla, Germana, Rusa, Pola** (bindita). Fr. 3 »
(La sama, broŝurita) . . . . . . . . . . . . . . . . . — 2 »
**Eldono Hispana** . . . . . . . . . . . . . . . . . — 1 »
— **Itala** (en presado) . . . . . . . . . . . . . . — 1 »
— **Greka** (en presado) . . . . . . . . . . . . . — » »
— **Rumana** (en preparo) . . . . . . . . . . . . — » »

*Oni vendas aparte :*

**EKZERCARO** (kvinlingva). . . . . . . . . . . . . . . . Fr. » 75
**UNIVERSALA VORTARO** (kvinlingva) . . . . . . . . . . — 1 »

## WÖRTERBUCH DEUTSCH-ESPERANTO

Dua eldono. Revidita, korektita, pliigita ! Ĝi estas la vera komplemento de **Universala Vortaro**.

Unu volumo, in-8, 178-paĝa. . . . . . . . . . . . . . . . . . Mk. 2 » / Fr. 2,50

## FUNDAMENTA KRESTOMATIO

Plej grava verko, kiun ĉiu devas legi por akiri perfektan stilon.

Unu volumo, in-8, 550-paĝa (broŝurita) . . . . . . . . . . . . Fr. 3,50

## HAMLETO

Tragedio en kvin aktoj de SHAKESPEARE.

Unu volumo, in-8, 176-paĝa (broŝurita). . . . . . . . . . . . Fr. 2 »

## LA REVIZORO

Komedio en kvin aktoj de N. V. GOGOL.

Unu volumo, in-8, 100-paĝa (broŝurita). . . . . . . . . . . . . Fr. 1,50

## LA PREDIKANTO

Libro el « LA BIBLIO ».

Broŝuro 28-paĝa . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Fr. 0,75

Librairie HACHETTE & Cie, 79, boulevard Saint-Germain, PARIS

# LA REVUO

**Internacia monata literatura gazeto**

EN ESPERANTO

Kun la konstanta kunlaborado

DE

**Dro L. L. ZAMENHOF**

Aŭtoro de la lingvo Esperanto

Plej bonstila, zorge revidita, bele presita, akurate eldonata, **La Revuo** publikigas novelojn, teatraĵojn, romanojn, poeziojn, seriozajn studojn pri popolmoroj, historio, geografio, k. c. Ĉiu numero enhavas bibliografian parton kaj tutmondan kronikon.

*Ĉiu numero havas 48 paĝojn da plej bona teksto!*

ONI ABONAS :

**Francujo.** — Librejo HACHETTE & Ko, 79, boulevard Saint-Germain, *PARIS*, unu numero 50 centimoj, jara abono . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Fr. 6

**Danujo.** — ANDR.-FRED HÖST & SÖN, Bredgade, 35, *KJÖBENHAVN*, unu numero 50 öre, jara abono . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Kr. 4,50

**Germanujo kaj Aŭstrujo-Hungarujo.** — ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, Prinzenstrasse, 95, *BERLIN*, unu numero 45 pfenigoj, jara abono . . . . . . . . M. 5

**Granda Britujo kaj kolonioj.** — REVIEW OF REVIEWS, Norfolk street, *LONDON W. C.*, unu numero 6 penc., jara abono . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . S. 6

**Hispanujo.** — J. ESPASA, 579, calle de las Cortes, *BARCELONA*, jara abono . . . P. 8

**Italujo.** — R. GIUSTI, 53, via Vittorio Emanuele, *LIVORNO*, unu numero 50 cent., jara abono . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . L. 7

**Rusujo.** — M. ARCT, Nowy Swiat, *WARSZAWA*, unu numero 25 kop., jara abono. . R. 2,80

**Svedujo kaj Finnlando.** — P. AHLBERG, 37, Surbrunnsgatan, *STOCKHOLM*, unu numero 50 öre, jara abono . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Kr. 4,50

**Por la landoj, kie ne estas abonejo**, sin turni al firmo HACHETTE & Ko en *PARIS*; jara abono (por tiuj landoj) . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Fr. 7

*Oni akceptas pagon de l' abono nur per poŝtmandato aŭ ĉeko.*

Librejo **HACHETTE & K<sup>o</sup>**, **79**, boulevard Saint-Germain, **PARIS**

# Tutmonda Jarlibro Esperantista

ENHAVANTA LA

## Adresaron de Dro ZAMENHOF

Tiu ĉi jarlibro estas eldonita ĉiujare por la Kongreso. Ĝi entenas : pli ol 20,000 adresojn de Esperantistoj de l' tuta mondo, plenan sciigon pri la propagandaj Societoj, pri la gazetoj, k. t. p.

Unu volumo, in-16, broŝurita . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Fr. **2,50**

Francaj Esperantistaj Grupoj

ATENTU !

**La plej bona propagandilo estas la**

# RUĜA BROŜURO

**Premier Manuel d'Esperanto**

SPECIALE ELDONITA POR HELPI LA LOKAN PROPAGANDON

*Sin turni al la*

**Librejo HACHETTE & Cie**

79, boulevard Saint-Germain

PARIS

**TUTE SPECIALAJ KONDIĈOJ POR LA FRANCAJ GRUPOJ**

Librejo HACHETTE & K$^{io}$, 79, boulevard Saint-Germain, PARIS

# Kolekto de « LA REVUO »

*POR AKIRI PERFEKTAN STILON, LEGU*

## GRAMMAIRE COMPLÈTE D'ESPERANTO

de CAMILLE AYMONIER, profesoro ĉe la liceo « Charlemagne ».

La sole vere plena gramatiko, laŭ plej scienca kaj logika plano.

Ĝi estas kaj estos la **modelo** de l' Gramatikoj.

Speciale taŭgas por **superaj kursoj**.

Eĉ nefrancoj havos grandan utilon de ĝia lernado.

Unu volumo, in-8, broŝurita . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Fr. **1,50**

*Tiu ĉi verko estas la unua, de plena franca kolekto da verkoj por la lernado kaj instruado de Esperanto, publikigitaj sub la kontrolo de « La Revuo ».*

*TIU KOLEKTO ENTENOS :*

## COURS PRATIQUE D'ESPERANTO

de S$^{oj}$ CLARAC kaj WINTZWEILER, profesoroj en Parizaj liceoj.

## EKZERCOLIBROJ

de S$^{o}$ CAMILLE AYMONIER.

## DIALOGARO

Kolekto da 3000 frazoj pri diversaj temoj de H. DE COPPET.

## LEKSIKONOJ

de S$^{o}$ HORACE HUET

(*Sekvo.*)

ANGLUJO. — REVIEW of REVIEWS, *Norfolk street', LONDON*, W. C.

**First lessons in Esperanto**, by Th. Cart and J. Rhodes . . . . . . 6d
**Esperanto : The Student's complete Text-Book**, with two vocabularies by J. C. O'Connor Ph. Dr. M. A. . . . . . . . . . . . . . . . . 1s 6d
**Esperanto-English dictionary**, by A. Motteau. . . . . . . . . . 1s 6d
**English-Esperanto dictionary**, by J. C. O'Connor Ph. Dr. M. A.. 1s 6d
**Grammar and exercises of the International Language Esperanto**, by Richard H. Geoghegan. . . . . . . . . . . . . . . . . . 1s 6d
**Dickens, Kristnaska sonorado (A Christmas Carol)**, tradukita de M. Vestcott. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1s »

---

BELGUJO — HOLANDUJO. — A.-J. WITTERYCK-DELPLACE
*4, Nouvelle Promenade, BRUGES*

**Het Esperanto in tien lessen**, door A.-J. Witteryck naar Cart et Pagnier . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . » 50
**Paĝoj el la Flandra Literaturo**, tradukitaj de Dro Seynaeve et Dro van Melckebeke. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1 50

---

BOHEMUJO. — TH. ĈEJKA, *BYSTRICE-HOSTYN* (Moravio)

**Uplná Mluvnice a Cvicebnice** napsali Th. Ĉejka a Jos. Krumpholc. Kr. 1 10

---

BULGARUJO. — KLUBO « STELO », *PLOVDIV*

**Esperanto en 10 lecionoj**, de Cart kaj Pagnier . . . . . . . . . . 1 »
**Unuaj lecionoj**, de Cart kaj Atanasov. . . . . . . . . . . . . » 40
**Propaganda folio**. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . » 10

---

DANUJO. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, *Bredgade 35, KJÖBENHAVN*

**Fuldstændig Lærebog i Esperanto**, af F. Skeel-Giörling. . . . Kr. 3 »
**Esperanto-Dansk-Norsk Ordbog**, af F. Skeel-Giörling . . . . Kr. 3 50
**Dansk-Esperanto Ordbog**. . . . . . . . . . . . . . . . . . . » »

---

GERMANUJO. — MÖLLER & BOREL, *Prinzenstrasse, 95, BERLIN*

**Anfangsgründe der Esperanto-Sprache**, von Th. Cart und Hermann Jürgensen. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . M » 35
**Vollständiges Lehrbuch der Esperanto-Sprache**, von J. Borel. . M 1 20
**Wörterbuch Deutsch-Esperanto**, von Dr Zamenhof. . . . . . . M 2 »
**Wörterbuch Esperanto-Deutsch**, von H. Jürgensen. . . . . . . M 2 »
**Schlüssel zum Lehrbuch der Esperanto-Sprache**, von J. Borel. M » 50
**Pri unu speco de Kurbaj linioj**, von Profesor A. Dombrovski. . M » 50
**Lernolibro de Esperanta Stenografio** (laŭ sistemo Stolze-Schrey) de F. Schneeberger . . . . . . . . . . . . . . . . . . . M » 80
**Elektitaj Fabeloj**, de Fratoj Grimm, tradukis Dro Kabe. . . . M 1 50

---

HISPANUJO. — J. ESPASA, *579, Calle de las Cortes. BARCELONA*

**Primeras lecciones de Esperanto** de Th. Cart y L. Villanueva. . P » 40
**Manual y Ejercicios de la lengua internacional Esperanto**, por V. Inglada Ors y A. L. Villanueva. . . . . . . . . . . . . . . . P 3 »
**Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto**, por Inglada Ors y Villanueva . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . P 6 »

---

(*Turnu*)

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL
Esperanto
505 II

(*Sekvo.*)

ITALUJO. — RAFI...

*53, Via Vittorio Emanuele, LIVORNO*

**Prime lezioni d'Esperanto** de Th. Cart e Alb. Gallois . . . . . . . » 40
**Grammatica della lingua internazionale Esperanto** di L. de Beaufront, tradotta da G. Puccinelli. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1 50
**L'Esperanto in dieci lezioni**, di Cart e Gallois. . . . . . . . . . . » 75
**Dizionario Esperanto-Italiano**, de J. Puccinelli. . . . . . . . . . 1 50
**Dizionario Italiano-Esperanto**, de J. Meazzini (*in preparazione*).

POLUJO. — M. ARCT, *53, Nowy Swiat, WARSZAWA*

**Esperanto** : Czecs I. **Gramatyka i cwiczenia**, Dr L. Zamenhof. . R. » 25
— Czecs II. **Slownik**. . . . . . . . — . . R » 15
**Internacia Krestomatio**, elektis kaj tradukis Dro Kabe. . . . Fr. 1 50

PORTUGALUJO. — BRAZILUJO

**Primeiras lições de Esperanto**, do professor Th. Cart, trad. portugueza de A.-C. Coutinho, Paris, Hachette. . . . . . . . . . . . . . . . » 40

SVEDUJO. — *Esperantoförening, STOCKHOLM*

**Esperanto-Svensk ordbok**, de P. Ahlberg . . . . . . . . . . Kr. 1 75

# MUZIKO

**Himno al Zamenhof**, paroloj kaj muziko de R. Deshays . . . . . . 1 »
**La Kanto de l'Cigno**, (melodio) poemo de Svirıdov, muziko de F. de Ménil . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1 »
**La Vojo**, (kanto kaj fortepiano), paroloj de Dro Zamenhof, muziko de R. Deshays . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . » 35
**Esperanto**, (valso por fortepiano), muziko de A. F. de Ménil . . . » 50

# DIVERSAJ VERKOJ

**L'Esperanto**, *Conférence aux officiers de l'École supérieure de Marine*, par M. Carlo Bourlet . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . » 50
**Essence et avenir de l'idée d'une langue internationale**, par Unuel, trad. par L. de Beaufront et le Dr Vallienne . . . . . . . . . . . » 30
**Anatomia Vortaro** (kvarlingva) verkita de la Medicina Esperantista Grupo . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1 50
**Tutmonda jarlibro esperantista por 1906** . . . . . . . . . . . 3 50
Couturat (L.) et Leau (L.). — **Histoire de la langue universelle**. . 10 »
— **Extraits de l'Histoire de la langue universelle**. . . . . . . . 1 »
Lafargue (G.). — **Nécessité de l'adoption d'une langue internationale auxiliaire**. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1 »
Ménil (F. de). — **L'héritage Klodarec**, comédie en un acte, *pour la propagande de l'Esperanto* . . . . . . . . . . . . . . . . . . . » 75
Sacré (E.). — **L'Esperanto**. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1 »
Thiaucourt (C.). — **Dernière conférence sur la Langue Internationale Esperanto**. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . 1 »

592-07. — Coulommiers Imp. PAUL BRODARD. — 6-07.